

ISSN: 0827-3154


2010/1

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

Printempo 2010

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

# LUMO



## La Esperanta literaturo riĉiĝas dank' al kanadaj esperantistoj

*La Origino de Specioj*: tradukis Klivo Lendon (p.3)

*Aventuro en mondo de ŝajnigado*: aŭtoris Jean Codjo (p.5)

*Lumon* eldonas trifoje en jaro KEA, 6358-A rue de Bordeau, Montréal (QC) Kanado H2G 2R8

*Lumo* ('light') is published three times per year by the Canadian Esperanto Association

*Lumo* ('lumière') est publié trois fois par année par l'Association canadienne d'espéranto

## ENHAVO DE LA NUMERO

**Agado kaj membroj de la kanada Esperanto-Movado**

<i>La Origino de Specioj</i> finfine aperis en Esperanta traduko (recenzo de S. T. Norvell) .....	3
<i>Aventuro en mondo de ŝajnigado</i> (recenzo de G. Matte).....	5
Pri mia unua Universala Kongreso (B. Williamson) .....	6
Oficiala anonco : Kanada Esperanto-Asocio serĉas kandidaton por Komitatano A .....	8
Subita tragedia morto: forpasis Adrian Boldan (K. Price).....	9
Unua fojo en ARE (S. Roy) .....	10
Pri NOREK-oj kaj NOREK 2009 (O. Du Temple).....	11
La luna pejzaĝo (tradukis M. T. Hopkins).....	13
Solvo de pasint-numera krucvort-enigmo.....	13
Nia enigmo (D. Reble) .....	14
Zamenhof-festo 2009 en Kalgario (P. Hopkins) .....	15
Redaktora angulo .....	15
Nova eldono de <i>La Eta Princo</i> (N. Fleury).....	16
Kalendaro: elektitaj renkontiĝoj de la kanada esperantistaro dum 2010.....	16

Eldonkvanto de ĉi tiu numero: **400**

Redaktis: Paul Hopkins

**Fontoj de la fotoj:** Kovrilo – katalogo de FEL, p. 3 – C. Lendon (Lendon), Vikipedio (Darwin); p. 5, 6, 7 – B. Williamson; p. 8 – Y. Bellefeuille; p. 9 – Ken Price; p. 11 – P. Hopkins (ODT), Vikipedio (Brahe), p. 12 – Vikipedio (Koperniko); p. 15 – P. Hopkins

**Provlegis:** Maria Hopkins, Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson

Presis kaj distribuis: Yves Bellefeuille

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn por plibonigi la revuon. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

**SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2010, BV. FARI TION NUN!**

Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por CA\$ 25 al

Kanada Esperanto-Asocio  
p/a Yves Bellefeuille, kasisto  
2372 Haddington  
Ottawa (ON) K1H 8J4



### *La Origino de Specioj.*

Karolo Darvino (angle: Charles Darwin), esperantigis el la angla Klivo Lendon. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2009. ISBN 978 90 77066 40 9. Broŝurita, 431 paĝoj:

CA\$ 36.00 (plus sendokostoj) de la Libro-servo de KEA.

2009, Internacia Darvino-jaro, estas la 200-jara datreveno de la naskiĝo de Karolo Roberto Darvino. Ĝi estas ankaŭ la 150-jara datreveno de la publikigo de lia libro, *La Origino de Specioj*, eble la plej influhava libro pri biologia pensado iam verkita.

Estas iom strange ke ĝis ĉi-jaro ne ekzistis Esperanta tradukaĵo en libroformo de ĉi tiu grava verko. Tamen la tradukinto, Klivo Lendon, jam dum kelkaj jaroj disponigis antaŭversion de la tradukaĵo en la interreto. Estas feliĉa okazo ke la Flandra Esperanto-Ligo decidis eldoni la libron agnoske de la Internacia Darvino-jaro kaj kiel la unuan en nova serio „Scienca Penso”.

Klivo (Cleve) Lendon estas, fakte, kanadano, kvankam li loĝas en Tokio, Japanio. Li laboras kiel programisto kaj tre aktivas pri Esperanto, pri kiu li estas agnoskita spertulo. Kanadanoj rajtas fieri pri sia samlandano.



**Klivo Lendo,**  
kanada tradukinto de  
*La Origino de Specioj*


Lendon elektis traduki la unuan eldonon de *La Origino de Specioj*, pro kialoj kiujn li klarigas en sia antaŭparolo. Estis ses oficialaj eldonoj en la angla dum la

vivodaŭro de Darvino, kaj en tiuj kiuj sekvis la unuan, Darvino iom rearanĝis la libron, strebis pli bone klarigi aferojn, kaj respondis al malfavoraj kritikoj. Tamen, la unua eldono estas historie la plej grava. Estas la unua kiu tremigis la mondon. Do, Lendon tute ĝuste elektis. La unua eldono aperis je la 24a de novembro, 1859, kun titolo: *Pri la origino de specioj per natura selekto, aŭ la konservo de favorataj rasoj en la lukto por vivo*. La eldono elĉerpiĝis post nur unu tago.

Kiel Lendon diris, Darvino verkis foje per bela literatura stilo kaj foje per komplikaj frazoj kiuj estas malfacilaj por kompreni. Lendon akceptis la ŝarĝon ke estas la responso de la tradukanto helpi la legonton kompreni. Tiucele li jen kaj jen dividis frazojn kaj aldonis klarigojn per entekstaj rimarkoj inter rektaj krampoj kaj per piednotoj. Li inkludis valoran historian skizon, kiu estis verkita de Darvino, kaj kiu aperis unuafoje nur en la tria eldono, pri la progreso de opinioj pri la origino de specioj antaŭ la apero de la unua eldono. Li ankaŭ aldonis utilajn informojn pri difinoj, klasifikado de vivaĵoj, kaj pri la geologia temposkalo.

En 1859 Darvino estis jam establita biologo. Li estis konata pro sia verkado de *La Vojaĝo de la Biglo* eldonita en jaro 1839. Li estis ankaŭ la aŭtoro de multaj sciencaj referaĵoj pri geologio kaj biologio.

Li estis monda spertulo pri ciripeds (subklaso de maraj krustacoj kiu inkludas la balanojn) (PIV), kiujn li studis dum ok



**Karolo Darvino,**  
aŭtoro de *La Origino de Specioj*, en 1854

jaroj. Li estis kompetenta geologo. Li havis vastan scion pri multaj plantoj kaj animaloj sur pluraj kontinentoj kaj en diversaj regionoj de la maro. Li ankaŭ interesiĝis pri la bredado de variaĵoj de malsovaĝaj kolomboj. Jam en 1837 li komencis skribi en notlibro pri „la transmutacio de specioj”. Influita de Thomas Malthus, li jam komencis konstati ke ekzistas fundamenta leĝo de naturo: „multiĝu, variu, la plej fortaj vivu, kaj la plej malfortaj mortu” (paĝo 222). Li komencis vidi ke individua variado en kombino kun la lukto por ekzisto estis la ŝlosilo, kaj ke variaĵoj kaj specioj estas nur gradoj de la sama procezo. Li planis verki dum multaj jaroj grandan libron kun vasta dokumentado pri sia teorio.

Tamen, en februaro de 1858 Darvino ricevis leteron kaj eseon de biologo, Alfred Russell Wallace, kiu laboris en la malaja arkipelago. Wallace estis alveninta al precize la sama ideo kiel Darvino! Por protekti la prioritatem de Darvino, amikoj de Darvino aranĝis prezentadon de du referaĵoj ĉe la venonta kunveno de la Societo Linnaeus, unu de Wallace kaj unu de Darvino. La afero pri la libro nun fariĝis urĝa. Dum nur okdek monatoj li verkis sian libron, *La Origino de Specioj*, el materialo jam ĉemane. Ĝi estis nur ombro de la libro kiun li planis.

De la vidpunkto de la leganto tamen, *La Origino de Specioj* estas majstroverko el atente elpensitaj argumentoj subtenataj per multnombraj ekzemploj. Ĉie troviĝas faktoj. Ja estas opinioj, sed ili malmultas; informoj abundas. Tio kio aparte impresas la leganton, estas ke Darvino ofte identigas kaj detale diskutas problemojn kaj malfortajn argumentojn en sia teorio. Darvino sufiĉe ofte identigis kampojn pri

kiuj informoj mankas aŭ nesufiĉas, kaj la vorto „nescio” aperas en preskaŭ ĉiu ĉapitro. La leganto rapide gajnas la impreson ke parolas al li pacienca kaj modesta profesoro kun kaj nova teorio kaj nekredible granda amaso da informoj por kunhavigi kun li.

Oni povas imagi ke premo sur Darvino rapide verki kaj publikigi la ombrolibron, *La Origino de Specioj*, estis kaŝita beno. Sen la premo, eble la granda libro, kiun li planis, estus neniam finita, aŭ, se finita, estus tiom granda kaj plenplena de dokumentado, ke ĝi estus nelegebla, almenaŭ fare de la laikaro.

Kiam Darvino verkis la libron, neniu havis iun ideon pri la mekanismo de heredo. Li nur sciis ke estas konstanta variado en individuaj plantoj kaj animaloj, kaj ke la novaj trajtoj, kiom ŝajne malgravaj, reaperis en la idoj, aparte se ili iomete helpis la individuon en la lukto por ekzisto. Fojfoje Darvino eĉ pensis ke eble „medi-instigitaj ŝanĝoj ĉe individuoj estas heredebaj” (PIV) – la tiel nomata lamarkismo – tamen aliloke Darvino prezentas argumentojn kontraŭ la lamarkismo.

Pro la granda fleksebleco de Esperanto, oni povus multmaniere traduki iun ajn frazon el la angla originalo. La elekto dependas de la interpreto fare de la tradukisto pri la vera signifo de la originalo. Oni tradukas ideojn, ne vortojn. Jen kaj jen mi tradukis frazon el la angla originalo kaj komparis mian tradukon kun tiu de Lendon. Laŭ mia takso, la traduko de Lendon bone fluas kaj estas tute fidela al la ideoj de Darvino.


En nur unu bagatela afero povus mi iomete malkonsenti pri la traduko de Lendon. Miaopinie, li estis iom tro fidela al la originalo kiam li tradukis „Esquimaux” kiel „Eskimoj” (paĝo 54); esperantistoj, aparte

kanadanoj, devus eviti tiun mallaŭdan terminon kaj elekti la vorton „Inuitoj”, kiu troviĝas en PIV ekde 2005.

lerte traduklaboris por aldoni ĉi tiun gravan libron al nia literaturo, kaj al FEL, kiu eldonis ĝin libroforme.

Ni dankas al Klivo Lendon ke li longe kaj

— Steĉjo Norvell (Novlando)



*Aventura en mondo de ŝajnegado.* Jean Codjo. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2009. 978-90-77066-42-3. Broŝurita, 44 paĝoj: CA\$ 10.00 (plus sendokostoj) de la Libroservo de KEA.

Tiu malgranda 44-paĝa novelo de Jean Codjo, beninano nun loĝanta en Kanado, traktas la aventurojn de Jeko kiu migras en Eŭropo kaj Nord-Ameriko for de la vilaĝo afrika.

Kvankam la aŭtoro pentras la mondojn eŭropan kaj nord-amerikan kiel mondojn de ŝajnegado kaj de iluzio, Jeko elektas loĝi, amindumi kaj labori en tiu mondo anstataŭ reiri al la perdita paradizo.

La romano sugestas ke ju pli oni estas for de la origina naskiĝloko, des pli ĝi aspektas kiel paradizo perdita. Tamen la aŭtoro ankaŭ asertas ke homoj povas adopti novajn sistemojn, vivmanierojn, pensmanieron kaj finfine, kiel li skribas, « la surtera paradizo povus esti ĉie kaj samtempe nenie ».

Bele skribita, en lingvo facile komprenebla de meznivelaj studentoj de la lingvo, tamen, kiam alineo ampleksas pli ol tuta paĝo, tio povas malkuraĝigi leganton pro manko da spaco, da aero, da spiro.



Jean Codjo dum UK Bjalistoko

— Guy Matte



- Politiko
- Sporto
- Scienco
- Komputado
- Moderna vivo
- Hobio ...

Sendependa internacia revuo pri politiko, ekonomio kaj kulturo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

Abonu nun ĉe la libroservo de KEA,  
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal Qc, H2G 2R8,  
<libroservo@esperanto.qc.ca>.  
Prezo por unu jaro 84 CAD



94-a Universala Kongreso de Esperanto  
25.07-1.08.2009  
Bjalistoko, Pollando

## Pri mia unua Universala Kongreso

Dum 25 jaroj mi jam revis pri ĉeesto de Universala Kongreso. Somere de 2009 mi finfine kaj unuafoje vojaĝis de Halifakso (Kanado) al Pollando por ĉeesti la 94-an Universalan Kongreson en Bjalistoko, la urbo kie antaŭ 150 jaroj naskiĝis L.L. Zamenhof. Por ne malŝpari bonan okazon, mi ankaŭ partoprenis antaŭkongresan kaj postkongresan ekskursojn. Mi multe ĝuis la spertojn, pro diversaj kialoj.

Estis por mi interese kaj lokoj la fama havenurbo Gdansko, la ĉefurbego Varsovio, la kongresa urbo Bjalistoko, kaj ekskursaj celoj en Supraśl, la tatara vilaĝo Kruszyniany, Krakovo, Oświęcim, la salminejo de Wieliczka, kaj Częstochowa. Dum julio oni ŝajne forgesis ekŝalti la someron en Halifakso, sed la pola suno kontentige bonvenigis kaj varmigis min dum preskaŭ la tuta ferio. Post alveno kaj viziteto en Gdansko, mi trajnis Varsovien por renkonti la antaŭkongresan ekskurson tra Varsovio kaj ĉirkaŭaĵo. Juna, alta, volontula bjalistokano Konrad Andrzejuk lerte gvidis plenan aŭtobuson da geesperantistoj tra la granda urbo al interesaj vidindaĵoj, inkluzive Zamenhofaĵoj. Okcidente de la urbo ni ankaŭ vizitis la naskiĝdomon de F. Chopin en Żelazowa Wola; dum 2010 oni festas la 200-an naskiĝdatrevenon de la fama komponisto. Helpis Konrad-on ĉe Palaco Branicki varsovia



**Bruce Crisp (md) kaj Bob Williamson (d)**  
ĉe la Movada Foiro; inter ili Barbara  
Pietrzak

esperantisto Wojtek Usakiewicz, konata pro sia pasinta laboro ĉe Pola Radio en Esperanto. Iom pluvis dum nia sabata aŭtobusa alveno en Bjalistoko, sed la Movadan Foiro jam ĉeestis esperantistoj kaj bjalistokanoj. Oni tuj sentis sin ano de vigla, interesa kaj sufiĉe granda komunumo de pli ol 1800. La nova amikaro de la ekskurso rapide plivastiĝis tra la semajno dum la grandaj kunvenoj en la ĉefa tendego kaj en pli intimaj kunvenoj. Inter tiuj estis la kunveno de radio-amantoj sub la gvido de la bone konataj prezentistoj de radio-programoj el Pollando, Ĉinio kaj Kubo. La urbo mem estis amikema kaj gastigema, eĉ se estis unu-du frenezuloj. Ekuzo de malmultaj polaj vortoj (ekz. *dziękuję* [ĝenkuje]: dankon) multe helpis. Bjalistokanoj bone scias pri Esperanto, aparte post la malfermiĝo je julio 2009 de nova ekspoziciejo, la vizitinda Zamenhofa Centro.

La tutan semajnon plenigis kortuŝaj momentoj, sed aparte magia estis la momento kiam UEA-prezidanto Probal Daŝgupta alparolis la grandan ĉeestantaron. Kompreneble ĉeestis neforgeseblaj homoj. Eble mi devas pardonpeti al tiuj rekonebluloj pro la ĝeno al ili, kiun mi verŝajne kaŭzis kiam mi prezentis min. Ja estis la unua oportuno por danki al tiaj homoj pro siaj influoj. Mi pensas, ekzemple, pri la verkinto de mia unua vortaro (John Wells), la

tradukema kaj pensiga aktivulo (Humphrey Tonkin), la nepo de la iniciatinto (Louis C. Zaleski-Zamenhof), la pola verkisto kaj filmisto (Roman Dobrzyński) kaj aliaj famuloj. Mi aparte ĝuis la unuajn renkontojn kun homoj jam konataj per la radio kaj/aŭ retpoŝto, kiel ekzemple la redakta teamo kaj kunlaboremaj aŭskultantoj de la programoj de Pola Radio. Estis ankaŭ tute hazardaj renkontiĝoj kun homoj de diversaj landoj kaj lingvofonoj (inter ili, kanadanoj), el kiuj mi kelkajn jam antaŭe renkontis sed la aliajn ankoraŭ neniam. Ekzemple, mia hazarde elektita sam-ĉambrano en studenta loĝdomo de la Bjalistoka Politekniko estis amikema spertulo el Japanio, GORO Kimura, kiu multe agadis pri la kongresa temo: "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ." Unufoje, ĉe la kongresa manĝaĵejo, mi ĝuegis la kantadon kun gitaro de kubano Julian Hernandez, kiu ankaŭ akompanis la mirinde rapidan rep-kantadon de brazilano Tone. Dum la postkongresa ekskurso al Varsovio, Krakovo kaj aliaj urboj, bjalistoka bonkorulino Nina Pietuchowska kapable gvidis, tradukis kaj glatigis ĉiujn aferojn. Post la postkongresa ekskurso afablege renkontis kaj gvidis min en Varsovio la UEA-estraranino kaj redaktorino de Pola Radio, Barbara Pietrzak.



**Bob Williamson dum la Solena Malfermo**



**Bob kun E-muzikisto Ĵomart** betovenan "Odon al la Ĝojo". Aliflanke, mi ĝuis interalie divers-tamajn prelegojn, kunsidojn kaj spektaklojn; agrablan bankedon en la Hotelo Gołębiowski; ekskurson tra la urbo al diversaj Zamenhofaĵoj; koncertojn de ĴomArt, Nataŝa kaj Carina, de JoMo, kaj de aliaj bjalistokaj muzikaj grupoj; ekskursan vojaĝon orienten laŭ la tatara vojo; akcepton de Esperantic Studies Foundation; kaj diversajn okazojn por babili kun geamikoj internaciaj. Mi eĉ

Kiel simpla kongresano, kiu kontribuis nenion al la programo, mi povis libere elekti kaj ĝui la laborojn kaj informojn de multaj aliaj homoj. Nur la elekto estis problema. Pli ol iam ajn antaŭe multnombri kongresaj eroj, kaj ja veras la bone konata kongresa leĝo: se estas du aŭ pli da nepre ĉeestendaj kunsidoj, ili okazas samtempe. Multon mi maltrafis. La teatraĵojn, kiujn oni multe laŭdis, mi ne ĉeestis. Mi aŭdis nur la finon de la sub-ĉiela koncerto kun plena orkestro, ĥoro kaj solistoj, kiuj prezentis al centoj da bjalistokanoj en la centra urboplaco esperantlingvajn muzikaĵojn, kiel ekzemple la tradukitan



**Akcepto de Esperantic Studies Foundation dum UK Bjalistoko – maldekstre: Mark Fettes**



La urbocentra Esperanto-Cafe de  
Bjalistoko

gustumis lokan (sen-alkoholan) trinkaĵon "buzo" en la urbocentra Esperanto-Cafe kaj poste iom perdiĝis kun grupeto da gekongresanoj sur la noktaj stratoj. La librofoiro multe allogis, kaj mi iom tro multe elspezis kaj pezis mian valizon. Multon mi ricevis de volontuloj en la loka kongresa komitato, de gekongresanoj kaj de geamikoj. Pro tio mi multe dankas.

Ĉu oni nepre devus ĉeesti Universalan Kongreson?

Jes, almenaŭ unufoje, laŭ mia nuna opinio. Pro diversaj kialoj kaj dum multaj jaroj mi prokrastis la ĉeeston, sed mi jam konfesis esti prokrastemulo. Povas esti, ke mi jam fariĝus multe pli efika, kapabla kaj bona esperantisto, se mi nur pli frue estus fariĝinta kongresano, montrinta la vizaĝon, kaj jam ekkonatiĝinta kun multe pli da homoj. La sukcesojn de la kongreso atingis la multaj aktivuloj kiuj partoprenis. Amiko iam diris al mi, ke kongresanoj tro multnombros, kaj preferinde estas pli intimaj kunvenoj. Aliflanke, la deziratan partoprenon en kultura komunumo multe helpas la ekkonatiĝo kun multaj diversaj samideanoj. Kie oni pli facile trovu ilin? Kaj tio ja estas la celo, ĉu ne?

— Bob Williamson

### **Fine de marto KEA sendis la sekvan tekston al ĉiuj membroj per aparta poŝto:**

#### **Kanada Esperanto-Asocio serĉas kandidaton por Komitatano-A ĉe UEA**

La estraro de nia landa asocio rajtas elekti unu Komitatanon-A por reprezenti nin ĉe UEA, kaj ĝis la 15-a de aprilo ni serĉis tiun personon. Atentu ke ne temis pri la elekto de komitatanoj-B de UEA, kiuj estas elektitaj tutmonde fare de la individuaj membroj de UEA, kaj kie kanadano Mark Fettes estas kandidato.

Por esti nomumita komitatano-A de UEA por Kanado, oni devas esti Individua Membro de UEA jam dum 2008 kaj 2009, kaj ankaŭ resti Individua Membro dum oni estas komitatano. La deĵorperiodo estas tri-jara. Krome, oni planu ĉiujare partopreni proprakoste la Universalan Kongreson. KEA ne subvencias tiujn kostojn, sed komitatano pagas duonon de la kutima UK-kotizo. La estontaj Universalaj Kongresoj okazos en Havano (Kubo) en 2010, en Kopenhago (Danio) en 2011, kaj en Hanojo (Vjetnamio) en 2012. Memevidente, dum tiuj kongresoj, nia reprezentanto devos partopreni la komitat-kunsidojn, eĉ se aliaj interesaj aferoj okazas samtempe.

Nia limdato por akcepti sinproponojn: **la 15-a de aprilo**. Ni pardonpetas pro la malfrueco de la anonco, sed la sukcesa kandidato devas tuj plani sian partoprenon en la ĉi-jara Universala Kongreso, kaj tempo rapidas. Ni jam havas unu kandidaton, sed ni bonvenigas aliajn. La estraro de KEA planas elekti sian komitatanon-A **antaŭ la 20-a de aprilo**.

Ken Price, Sekretario de KEA  
kenprice13@sympatico.ca

Bob Williamson, Prezidanto de KEA  
bob.williamson@ns.sympatico.ca



## Subita Tragedia Morto: forpasis Adrian Boldan

Je 8:45 a.t.m. la 17an de novembro 2009, 65-jaraĝa Adrian Boldan estis frapita de aŭtomobilo kiam li estis transiranta la straton Greenwin Village ĉe Village Gate apud Bathurst-Strato kaj Steeles-Avenuo, kiel li faris ĉiumatene survoje al lia laborejo. Adrian estis transiranta la straton por iri al la bushaltejo sur la norda flanko. S-ro Boldan, kies kranio estis frakasita, estis transportita al hospitalo, kie li forpasis je 12:15 p.t.m.

La edzino, Hanna, flugis kun lia korpo al Israelo, kie Adrian estas entombigita en tombejo Beit Alumim. Laŭ juda tradicio tio devis esti farita ne pli ol 24 horoj post la mortotempo.

Rabeno Yoseph Zaltzman de la Juda Rusa Komunuma Centro priskribis sinjoron Boldan kiel komplezan viron. "Li estis tre afabla persono, nekredible afabla," Zaltzman diris. "Kion ajn oni petis de li, li ĉiam estis preta helpi."

Adrian, ortodoksa Judo, naskiĝis en Rumanio kaj edukiĝis en la Politeknika Universitato de Bukaresto, kie li studis komputikon kaj inĝenierion de 1961-1967. Li elmigris al Israelo, kie li loĝis en Hajfo ĝis kiam li enmigris Kanadon, kie li laboris dum kelkaj jaroj kiel programisto/analizisto por la firmao IBM en Toronto. Kiam ĝi reduktis la nombron da dungitoj, ĉ. 1984 pro la tiama malboniĝo de la ekonomio, li perdis sian postenon.



Adriano dum Toronta Zamenhof-Festo 2005  
reviziantoj de la Vikio de UEA.

Adrian estis prezidanto de la Esperanto-Rondo de Toronto dum kelkaj jaroj, kaj kiam Pierre Savoie redaktis ĝian bultenon *La Torontano*, Adrian presis ĝin.

Dum kelkaj jaroj Adrian funkciigis 'elektronan panelon' (BBS) en kiu li informis pri Esperanto, kaj instruis ĝin. Lastatempe li laboris kiel komputila konsultisto, sed ĉi-jare studis librotendadon, eble por komenci novan karieron. Adrian estis unu el la

Adrian estas priskribita kiel rabeno kaj filozofa. Lia manko estos sentata en la torontaj rondoj kie li estis konata - juda, rumana, esperantista, kaj en retaj diskut- kaj labor- grupoj.

Postvivas lin lia edzino Hanna en Toronto kaj du filinoj kaj multaj genepoj en Israelo.

Ni kondolencas al S-ino Boldan, kaj la familianoj en Israelo.

— Ken Price

Kaj pasis unu plia:

Lastatempe ni eksciis pri la morto de Higinio Garcia, longtempa membro kiu forpasis la 10-an de aprilo (2010) en Alma, Kebekio. Plena nekrologo aperos en la sekva numero de *Lumo*.



## Unua fojo en ARE


(el *La Riverego*, n-ro 98, decembro 2009)

Ĉi-oktobre (2009) okazis la dekseca Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista (ARE), kiu ĉiujare kunigas esperantistojn el nordorienta Nord-Ameriko. Por mi, estis malkovro de belega regiono kaj multaj novaj spertoj. Mi rakontu.



### La hotelo de Silvero, la ARE-renkontiĝejo

Silvero, la renkontiĝejo, troviĝas en la ŝtato Novjorkio, ĉe la lago Georgo, pli-malpli kvin-hora veturado el Tririvero. Ni decidis eliri vendredon, por ĝui pli longe la okazon. Do tiuvespere ni malstreĉiĝis surloke kaj ekkonis interesajn homojn, interalie la faman Bierfariston, kiu eldonas humorplenan Esperantan revuon en Usono, kaj ankaŭ Nijl el urbo Novjorko, kiu faris longan Esperantan vojaĝon ĉi-somere.



### La kajo de Silvero ĉe Lago Georgo

Sabaton matene, la suno invitis nin malkovri la belegan kaj grandegan bienon, kiu apartenas al YMCA kaj vidis, antaŭ 100 jaroj, naskiĝon de la usona skolta movado. Ĉar ni marŝis ekster la hotelo legante mapon, sinjorino ĉuis: «Perditaj?» Mi

replikis: «Ankoraŭ ne!» Post unu horo ni tute ne sciis, kie ni staras. Sed perdiĝo estas plezuro por sentimaj esplorantoj kiel ni! Post laciga sed agrablega promeno tra aŭtuna arbaro, ni retrovis la hotelon ĝustatempe por oficiala malfermiĝo de ARE.



### La Libroservo de ARE

Ĉeestis la Renkontiĝon ĉirkaŭ kvindek diversaĝaj kaj diversdevenaj esperantistoj, bela kunvenantaro, kies multajn trezorojn ni nur parte malkovris dum semajnfino... Ĉiu travivas tian renkontiĝon siamaniere. Spertaj partoprenantoj ĝuas revidi malnovajn amikojn. Novuloj ekkonas la Esperantan kulturon.

Mi travivis serion da «unua fojo»: unua antaŭpublika parolado en Esperanto, unua publika muzikludado kun mia amiko Karlo, unua briĝludado en Esperanto, unua nokta fajro kaj kantado en Esperanto, unua stel-observado en Esperanto...

Kia memorinda spertaro!

Ne eblas ĉion rakonti sed mi esperas, venontan aŭtunon vidi VIN ĉe la majesta lago. Kune (kaj Esperante!) ni kantos:

*Fajro varmega, via varmeco nin ĝojigas*

*Fajro varmega, varmigu la nokton.*

*Ni ŝategas varmecon, ni ŝategas fajron !*

*Fajro belega, via beleco... beligu la nokton*

*Fajro ruĝega, via ruĝeco... ruĝigu la nokton*

Elpensu aliajn !

— Suzanne Roy

## Pri NOREK-oj kaj NOREK 2009

La plejmulto de la kanadaj esperantistoj neniam partoprenis la Nord-Okcident-Regionan Esperanto-Kunveno-n, kaj ĉefe al tiuj estas destinitaj la sekvontaj rememoroj.

La unua NOREK okazis en Port Townsend (Vaŝingtonio) en 1982, kaj ekde tiam ĉiujare en iu loko proksima al la Pacifiko (escepte de Calgary kaj Boise), laŭ la invitoj de samideanoj kiuj loĝas ie en la okcidento de Usono kaj Kanado.

En la unuaj jaroj la iama kazernaro "Fort Worden" estis la favorata NOREK-ejo. Pli poste, pro maljuniĝado de la partoprenantoj, la organizantoj decidis serĉi pli konvenan lokon, lokon kie oni ne devas marŝi tra ekzercejo al kunvenejo, lokon kun lifto anstataŭ kruda ŝtuparo, lokon kun restoracio anstataŭ kantino. La suda parto de la Insulo Vankuvera, bone konata pro invito, estis la logika elekto. La NOREKoj okazis tie pli ol dekfoje, en diversaj hoteloj.

Ju pli ni spertiĝis en la organizado, des pli ni sentis la neceson havi gvidan temon por ĉiu jaro, kaj adopto de la Unesko-temo de la jaro estis taŭga.

Tiuj samideanoj, kiuj decidiĝis kontribui al la programo laŭ la Unesko-temo, konstatis ke la tempo necesa por la studado de la temo, serĉado de fontoj de informoj kaj tradukado de ali-lingvaj tekstoj en Esperanton, rezultis en pli bona scio kaj kompreno de la temo mem, kaj en pliriĉigo de la persona Esperanta vort-trezoro.

La temo de NOREK 2009 estis "astronomio" – sendube la plej vasta inter ĉiuj, ĉu ne? Kompreneble, la programeroj de NOREK tuŝis nian universon nur supraĵe, sed – espereble – provokis deziron ekscii pli pri ĉio menciita.



Olga Du Temple prelegas pri astronomio dum NOREK 2009

Historio de astronomio – ekde la pratempo – kaj koncernaj mitoj pri la universo estis prezentitaj en prelego de Maria kaj Paŭlo Hopkins.

Ralph Gonyea alportis fotojn kaj detale raportis pri la lastatempaj esploroj de la planedo Marso kaj pri la scienca signifo de tiuj.

Charli Ericson surprizis la aŭskultantaron parolante pri sia naskiĝloko, la kastelo Knutstorp (nuntempe en Svedio, antaŭe en Danlando), kiu - en la 16-a jarcento - apartenis al la nobela familio Brahe, kies unua filo, Tycho, iĝis fama mez-epoka astronomo. Legendoj pri lia iom bizara vivstilo ĝis nun altiras atenton.



Tycho Brahe

Mi transprenis tiun biografian rakontadon de Ĉarli, kaj daŭrigis en ĝi ĝis la mistera morto (aŭ murdo?) de Brahe en Prago, kiam li estis kortega astronomo kaj astrologo (kaj hobie ankaŭ alkemiisto) de la imperiestro Rudolfo la dua. Eĉ nun oni provas solvi la "408-jaraĝan malvarman kazon"!

La tempo dum kiu vivis Tycho Brahe, kaj la aliaj eĉ pli bone mondkonataj astronomoj, Koperniko kaj Galileo, estis la plej grava epoko en evoluo de homa scio kaj spirito, epoko de ne plu haltebla liberigo el katenoj kaj jugo de religio. Ekde tiam ĉiuj esploroj en la kampo de astronomio konfirmas, aplikas kaj antaŭenigas la teorion de Koperniko. Estas malfacile kompreni kiel li kapablis – sen teleskopo kaj sen komputilo – kalkuli astronomiajn datojn. Kaj unu jarcenton post li, ekipita per teleskopo, sed sen komputilo, Johano Keplero formulis la leĝojn de la planedaj orbitoj. Nun provu imagi: se, komence de la 17-a jarcento, ne vivus Galileo, kiu genie kombinis konkavajn kaj konveksajn lensoj por krei teleskopon, sed se en tiu tempo vivus Edisono, kiu eltrovis elektrajn ampolojn, ĉu nia Tero ankoraŭ estus “la centro de universo” kaj la homaro, blindigita de troa surtera lumo, ankoraŭ opinius sin “la supera kreaĵo de Dio”?

Se vi, la legantoj, interesiĝas pri astronomio, kaj pri la kontribuoj de diversaj geniaj sciencistoj al ĝia progreso, vi povas trovi amason da informoj per “Google”. Sed por akriĝi vian mensan apetiton jen kelkaj citaĵoj:

ARISTARKO – Greko (320-250 a.K.!!!) primokata de siaj samtempanoj:

“La Suno kaj aliaj steloj estas senmovaj. La planedoj, inkluzive la Tero, ĉirkaŭiras la Sunon laŭ cirkla orbitoj. Ŝajna turniĝado de universo estas fakte turniĝado de la Tero ĉirkaŭ ĝia akso. Ĉar la Tera orbito estas signifa kompare al la grandeco de universo, ni ne povas observi ŝanĝojn en pozicioj de steloj.”

**La estraro anoncas:** Post la 15-a de aprilo (2010), la estraro de KEA nomumis kiel reprezentanton de Kanado en la Komitato de UEA la solan kandidaton, Allan Simon el Kalgario. Koran dankon al li !

GIORDANO BRUNO – italo (1548-1600), kondamnita de la Inkvizicio al bruligo pro herezoj kiel tiu ĉi:

“La Universo estas senlima. Nia Suno kun siaj planedoj estas nur unu inter multegaj similaj sistemoj. Probable ekzistas aliaj enloĝigitaj mondoj kaj aliaj raciaj estaĵoj, kiuj egalas al ni aŭ eĉ superas nin.”

J.V.GOETO (Johann Wolfgang von Goethe) Germana verkisto (1749-1832), skribis jene pri Nikolao Koperniko:

“Inter ĉiuj malkovraĵoj kaj teorioj neniu pli efikis al homa spirito ol la doktrino de Koperniko. La mondo apenaŭ konatiĝis kun sia globa formo, kiam oni postulis de ĝi rezigni la



Koperniko

kolosan privilegion esti centro de la universo. Eble neniam oni postulis pli de homaro, ĉar pro ĉi tiu agnosko tiom da certecoj malaperis, kvazaŭ en nebulo aŭ fumo: Kio okazis al nia Edeno, al niaj naiveco, pieco kaj poezio, al atesto de niaj sensoj, al nia poezie religia kreda konvinko? Nemirinde, ke la sam-tempanoj de Koperniko deziris malaperigi ĉion tion, kaj amasigis reziston kontraŭ la doktrino, kiu en siaj konvertitoj aprobis – eĉ postulis – liberecon kaj grandanimecon de pensado, kiaj ĝis tiam ne estis konataj, ja eĉ ne prirevataj.”

- Olga du Temple

### La Luna Pejzaĝo

(mito de la nord-amerikaj indiĝenoj)

Kial la Luno serpentumas laŭ la stranga vojo tra la ĉielo?

Estis la tempo kiam la unuaj homoj venis al sur la Tero. Por dispeli la malhelon la Unua Viro kaj la Unua Virino faris la Sunon kaj la Lunon de la tranĉaĵo de kvarca kristalo, kiun ili formis en grandaj rondaj diskoj.

Poste ili ornamis la suno-diskon per masko de bluaj turkisoj por ke ili helpu doni la varmon kaj lumon. Krome ili alfiksis la ruĝajn koralojn ĉe la rando kaj ĉe la orekonkoj de la diskoj. Ankaŭ ili alfiksis aglajn, alaŭdajn kaj pegajn plumojn al la suno-disko por disvastigi la lumon kaj varmon en kvar direktoj.

La Unua Viro kaj la Unua Virino alligis la sun-diskon al la orienta ĉielo helpe de fulmo-sagoj. Sekve ili ornamis la lun-diskon per kristalo kaj blanka konko kaj ankaŭ alligis ĝin al la ĉielo.

La diskoj estis senmovaj; tial homoj komencis plendi ke estas tro da varmo en la oriento sed ne sufiĉe en la okcidento. La Unua Viro kaj la Unua Virino ne sciis kiel

fari ke diskoj moviĝu tra la ĉielo.

Tiam kun helpo venis du tre maljunaj homspiritoj kiuj ofertis doni siajn spiritojn al la diskoj por vigligi ilin.

Tamen, estis ankoraŭ alia problemo; laŭ kiuj vojoj la diskoj veturu tra la ĉielo?

La Unua Viro rigardis la aglon, kiel ĝi stiras sin per la vostaj plumoj, do li alfiksis dekdu plumojn al ambaŭ diskoj por direkti ilin laŭ ĝustaj vojoj en la ĉielo.

Tiel preta la Suno komencis la vojaĝon tra la ĉielo. Kiam la Suno komencis subiri, tiam la Luno komencis sian vojaĝon. Ĝuste tiam la Knabo-vento provis helpi la Lunon ekmoviĝi blovante sur ĝi. Tamen, la Knabo-vento blovis la plumojn de la Luno sur ŝia vizaĝo. Do, la Luno ne povis vidi kien ŝi iris. Rezulte de tio la Luno havas la neregulan vojon tra la ĉielo.

Ekde tiam la Suno estas la reganto de la lumo kaj la tago.

La Luno estas la reganto da la nokto kaj mallumo.

Ili donas vivo-energion al ĉio sur la Tero.

— tradukis Maria Hopkins



#### Solvo de krucvort-enigmo (aperis en Lumo 2009:2)

Ĉi-dekstre: la solvo de la krucvort-enigmo aperinta en la pasinta numero de Lumo. La redaktoro ricevis tute ĝustan solvon de Olga Du Temple. Gratulon al ŝi kaj al ĉiuj, kiuj provis solvi la enigmon!

A	C	E	R	R	E	D	A	K	T	A	N	T	A	J	N
Ŭ	A	T	O	N	C	I	M	O					B	O	A
T	R	A	T	A	S	G	O	L	F				A	D	I
O			S	A	V	S	O	L	E				K	O	V
D			K	N	E	D	S	U	K	E	R	O	N		
I			L	I	G	N	O	N	A	F	T	O	J		K
D			R	E	Ĝ	O	L	U	L	L	A	K		H	O
A	P	E	R	U	P	O	L	I	S	O	J		Ĉ	I	N
K	L	I	N	B	E	R	I	B	E	R		M	E	N	D
T	U	R	D	I	S	I	G	A	S		B	I	N	D	U
O	V		M	A	C	S	A	N		B	A	N	O		K
J		S	E	M	I	S	S	A	B	A	T	O			I
	E	L	V	O	K	O	S	N	A	Z	A				S
A	L	I			L	I	N	I	S	O	L				T
T	I	P			F	O	N	O	J	O	H	A	N	O	
A	R	O			B	A	N	D		N	U	B	A	J	
K	O	N	T	R	A	B	A	N	D	A	S		F	I	N

## Nia Enigmo

Dekstre: nova krucvort-enigmo de **Don Reble**

La nomoj de tiuj kiuj sendos siajn solvojn al la redaktoro aperos en la sekva numero de ĉi tiu revuo.

Bonŝancon!

1	2	3	4			5	6	7	8					9
10						11								
12					13					14		15	16	
17			18	19					20	21				
		22						23	24					
			25									26		
27		28							29			30		31
32	33			34	35	36		37			38			
39				40				41			42			
				43				44					45	
46	47	48							49	50	51			
52					53	54		55						
56				57				58					59	
60				61					62			63	64	
65									66					

## Ŝlosiloj (r = radikoj)

### Dekstren

- 1 estanta bonfareme, kompateme, k.s. (r)
- 5 muziknoteto, ludita ĵus antaŭ ĉefa noto
- 10 inkliniĝos
- 11 atestu je io sankta
- 12 herbo fariĝanta brila tolaĵo (r)
- 13 forta pro konsisto (r)
- 15 flugilo de birdo
- 17 hebreaj kantikoj
- 20 plej oftan likvon
- 22 ega malordo (r)
- 23 haŭtmakulo
- 25 tiujn aĵojn, kiuj montras ĝustan vojon
- 28 vorto kiel nedifina artikolo
- 29 mallonga verko
- 32 faris, ke metalpeco altiras feron
- 38 arbusteto kiel kaluno (r)

- 39 kapkvanto
- 40 aŭdigi diversajn fortajn sonojn, sen harmonio (r)
- 41 mankvanto
- 42 signu ion per kutima vorto
- 43 ŝafhararo (r)
- 44 eksteriga prefikso
- 45 helpa aĵo (r)
- 46 rilatan al multaj orient-eŭropaj popoloj
- 49 rimarkinda kapablo (r)
- 52 malgranda sango-suĉanta insekto (r)
- 53 pri ekonomiaj aspektoj de socio
- 56 religia ceremonio (r)
- 57 resti sur seĝo (r)
- 58 deziri ies posedon (r)
- 60 sufikso je kaŭzo
- 61 sinmovi (r)
- 62 portilojn por dokumentoj

- 65 meti disketojn en vestfendojn
- 66 grenad-forma frukto (r)

### Suben

- 1 havigi rimedon al iu
- 2 faris ion neprecizigitan
- 3 ano de religia komunumo (r)
- 4 nuntempa verbfinaĵo
- 5 objektoj
- 6 nemiksita (r)
- 7 kvarona angulo (r)
- 8 sentadi plezuron
- 9 unuon de elektra rezistanco
- 13 fari kavon en tero
- 14 eta Katerino
- 15 malnepo (r)
- 16 atentiga interjekcio
- 18 malprofunda apudmara lageto (r)

- |                                       |   |                                  |
|---------------------------------------|---|----------------------------------|
| 19 irigi (r)                          | 31 pri misteraj supernaturaj okazoj (r) | 50 movi kaj resti ĉe celloko (r) |
| 21 konforma al nunaj bezonoj (r)      | 33 disĉiplo, loĝanto (r)                | 51 nespecialista, nefaka (ulo)   |
| 23 proksimiĝa prepozicio              | 34 povanta fari                         | 54 lirika poemo (r)              |
| 24 demandanta specialiston            | 35 moviĝu al alia flanko                | 55 ĉe iu loko                    |
| 26 forigi malbonaĵojn el la korpo (r) | 36 akuzativo de 28-dekstre              | 57 refleksiva pronomo            |
| 27 neflugipova birdo kiel struto (r)  | 37 pensaĵo (r)                          | 59 kurba tenilo (r)              |
| 28 kaŭzo                              | 46 desegni vortojn (r)                  | 63 sufikso de egalaj partoj      |
| 30 elementa peceto                    | 47 donu limtempe, kontraŭ prezo         | 64 emfaza vorto                  |
|                                       | 48 ja super la tero (r)                 |                                  |

## Zamenhof-festo 2009 en Kalgario

London la 14-an de decembro (2009), en la vespero antaŭ la 150-a naskiĝ-datreveno de la nia majstro L.L. Zamenhof, esperantistoj de Kalgario kuniĝis en la hejmo de Allan kaj Meredith Simon por festi tiun datrevenon kaj la jarfinajn festotagojn. Ni manĝetis, babilis, ĝoje kantis, kaj pasigis agrablan vesperon kune. Ni ankaŭ pensas pri la estonteco: la Rondo decidis krei Esperanto-kantaron, en kiu aperu (kun muziknotoj) la plej ŝatataj kantoj de la klubanoj, inter ili kompreneble tiuj verkitaj kaj tradukitaj de niaj – nun forpasintaj – eminentulinoj Dorothy Hawley kaj Betty Salt.



**Anoj de la Kalgaria Esperanto-Rondo.**  
De maldekstre : Yoshiki, Milan, Jacqueline, Meredith, Jean-François, Maria kaj Allan.

### Redaktora angulo

Pasint-jare ni ne povis realigi la planon aperigi tri numerojn de *Lumo* jare: ĉi-jare ni ja certe sukcesos. Vi nun do legas la unuan, printempan, numeron por 2010: ni antaŭvidas aperigi duan numeron dum la somero kaj trian numeron dum la aŭtuno. Jam alvenis iuj tekstoj por la dua numero – ampleksa artikolo pri Avalonio kaj interesa artikolo pri la historio de unu instruilo uzita dum la somera Esperanto-kursaro ĉe Ŝtata Universitato de Sanfrancisko – kaj antaŭvideble aperos en ĝi ankaŭ raporto pri MeKaRo 2010 kaj la Financa Raporto de KEA 2009. Tamen ankoraŭ restas loko por viaj raportoj, artikoloj, recenzoj, ŝercoj, enigmoj, anoncoj, ktp. Gravus nur ke ili estu originalaj – ni ja ne volas ke *Lumo* estu regurdaĵo de tio, kio jam aperis aliloke. Sendu do viajn kontribuojn al:

**Paul Hopkins < hoppaul ĉe gmail.com >**

**#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5**



## Nova eldono de *La Eta Princo*

Post plurjara elĉerpiĝo, aperos fine de la printempo 2010, la tria eldono de la mondkonata verko, *La Eta Princo* de Saint-Exupéry!

La libro unue eldoniĝis en 1961 en Francio danke al la traduko de Pierre Delaire. Poste, la Kanada Esperanto-Asocio reeldonis ĝin en 1984 en traduko funde reviziita de Delaire mem. La tria eldono postulis grandegan laboron, ĉar temis ne pri simpla reeldono sed pri kompleta reviziado de la traduko kaj nova, multe pli altkvalita, grafika prilaborado.



Normando Fleury, nome de KEA, kunordigis la laboron kaj transdonis al Francisko Lorrain la respondecon gvidi revizian teamon. Sume, ok personoj el kvin landoj detale atentis pri la lingva nivelo kaj fideleco de la traduko.

Estis longa traktado kun Gallimard pri la kopirajtoj. Kompreneble la nova eldono entenos la originalajn bildojn de la aŭtoro, lastatempe altkvalite ciferigitajn. Tiun novan eldonon de *La Eta Princo* aperigos kune du asocioj, nome KEA kaj Esperanto-France. Bruno Flochon de EF aparte helpis, por ke la libro estu presata en Francio je favoraj kondiĉoj. Ni uzos ekologian paperon, kiu respektas la arbaron.

Se vi volas esti inter la unuaj homoj, kiuj havos la ŝancon posedi ekzempleron de tiu valora kaj grava verko de la monda literaturo, vi povas tuj mendi ĝin de la Libroservo de KEA. Ni sendos al vi la libron kun fakturo, tuj post ricevo de stoko el Francio. La prezo estos ĉirkaŭ 25\$ kanadaj, depende de la kurzo kompare al eŭro. La sendokostoj dependas de kiom fore vi loĝas de Montrealo laŭ la kanada poŝta tarifo.

Normando Fleury

Libroservo de KEA

6358, rue de Bordeaux

Montréal, Québec, H2G 2R8

[libroservo@esperanto.qc.ca](mailto:libroservo@esperanto.qc.ca)

## Kalendaro

### Elektitaj renkontiĝoj de la kanada esperantistaro dum 2010:

#### 22-a ĝis 24-a de majo

**Trois Rivières** (Kebekio): 8-a Mez-Kanada Renkontiĝo (MeKaRo). Informoj pri loĝeblecoj kaj programo ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/mekaro8>

#### 9-a ĝis 11-a de oktobro

**Silver Bay** (Novjorkio): 17-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE). Plenaj informoj kaj aliĝilo ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/are>